# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke

Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 23. Aprilo 21, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**


## Kongresa progreso

Estas nur kelkaj semajnoj (precize 120 tagoj) ĝis la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, la plej granda kunveno de esperantistoj el la tuta mondo, kiu okazos ĉi-jare en la bela itala urbo Torino. La kongreso okazos de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023 kaj ĝia ĉeftemo estas "Enmigrado kaj kunfluo de homaj valoroj". Jam preskaŭ 900 homoj el 55 landoj aliĝis - **Por aliĝi bv. iri al la koncerna paĝo: https://uk.esperanto.net/2023/ La kongreso logu pli ol mil partoprenantojn!**

La Universala Kongreso de Esperanto estas grava kaj la plej granda evento por la Esperanto-parolantoj. Ĝi estas brila okazo renkonti homojn el la tuta mondo kaj por plibonigi lingvajn kaj interkulturajn kapablojn. Ĉiu, kiu havas iun ajn interesiĝon pri Esperanto aŭ pri la celoj de la movado, estas bonvena partopreni. Rapidu aliĝi! La kongreso estos ne nur eduka, sed ankaŭ amuza kaj emociplena sperto. Estas certe, ke la partoprenantoj foriros el la kongreso plenaj je novaj ideoj kaj kun pli fortigitaj ligoj inter la Esperanto-komunumo el la tuta mondo. Ni atendas vin senpacience en Torino!

Detaloj pri la UK: https://uea.org/kongresoj
Hejmpaĝo pri UK de la LKK: https://www.esperanto.it/torino2023
Facebook-paĝo de la UK 2023: https://www.facebook.com/uktorino2023
Telegram-grupo de UK 2023: https://uk.telegramo.org/

La plenan Komunikon bv. trovi en: https://uea.org/gk/110

## Esperantologia Konferenco en preparo por Torino

La organizantoj alvokas ĉiujn fakulojn, esploristojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la 45-a Esperantologia Konferenco de CED, sub la aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). La aranĝo estos hibrida, ebligante partoprenon rete kaj ĉeeste, kadre de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio.

Du tri-horaj sesioj enhavos plurajn dudek-minutajn referaĵojn, elektitajn el inter la ricevitaj proponoj, kun fina ronda tablo pri la nunaj esploraj defioj de Esperantologio rilate al fontoj kaj arkivoj. Ni bonvenigas proponojn de Esperanto-rilataj studobjektoj en fakoj kiel lingvistiko, historio, sociologio, antropologio kaj literaturaj studoj; ankaŭ interfakaj proponoj bonvenas. Aparte bonvenaj estos proponoj kiuj analizas aspektojn de Esperanto, esperantologio kaj interlingvistiko en Italio, honore al la lando kiu gastigas la ĉi-jaran kongreson. Surbaze de la prezentoj, kelkaj elektitaj tekstoj, redaktitaj de la aŭtoroj por publikigo, aperos en la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies.*

**Ni invitas ĉiujn fakulojn - aparte junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn - sendi proponojn** pri referaĵoj. La proponoj, enhavantaj inter 150 kaj 200 vortojn, devas esti sendataj al la retadresoj de la organizantoj: <jalcaldevi [ĉe] uoc.edu> kaj <mtfettes [ĉe] sfu.ca>. Ni ankaŭ petas ke la proponantoj indiku, ĉu ili intencas prezenti ĉeeste aŭ virtuale.

La limdato por proponoj estas la **15-a de majo 2023**.

Por kontroli la programon de antaŭaj konferencoj, vizitu la retejon de CED.

Javier Alcalde, Guilherme Fians kaj Mark Fettes, Organizantoj de EK 2023

## Klimata Ŝanĝo kaj la Hidrogena Ekonomio

La Konferenco pri Klimata Ŝanĝo de UN COP27, 2022 deklaris "La mondo estas en krita jardeko por klimata ago. Limigi varmiĝon al ĉirkaŭ 1,5°C postulas, ke la tutmondaj ellasoj de forceja gaso ekmalaltiĝu antaŭ 2025, kaj estu reduktitaj je 43% antaŭ 2030. Tio lasas nur 7 mallongajn jarojn de nun."

Jam estis konfirmite, ke 90% de la klimata ŝanĝiĝo devenas de homaj agadoj, el kiuj 55% estas pro karbondioksido. ĉiuj registaroj luktas malaltigi forcejan gason, kaj investas diversamaniere al hidrogena ekonomio (produkto, transporto kaj aliaj, ĉar laŭ multaj, hidrogeno estas la nura energio kiu povas anstataŭi fosiliajn brulaĵojn. Legu la plenan tekston en la alkroĉita dokumento.
Aldonaĵo estas

## Kurso en Nantes

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Daŭriga kurso
Gvidantonomo: Robineau Bruno
Tipo: Nova movada kurso
Loko Nantes, Francio
Aldoninto: BRUNO49

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27526

## Du kilogramoj da libroj atingis sekure Senegalon

SMG provas malplenigi sian apartamenton de centoj da revuoj kaj libroj, kiuj pli bone servu al la komunumanoj ol perei en Budapeŝto. Plia sendo al Tanzanio estas en preparo.

## Reviviĝis en Nederlando la studsemajnfinoj

Post pandemia interrompo estis granda ĝojo denove okazigi niajn tradiciajn studsemajnfinojn en 2022. La unua okazis de la 25-a ĝis la 27-a de marto. Tamen la kronviruso ankoraŭ influis ĝin. Unue, ĉar ni decidis akcepti malpli de partoprenantoj ol antaŭe, por ke ni kunsidu malpli dense kaj disponu pri pli da persona spaco en la dormejoj. Due, kaj pli grave, ĉar unu el la kuirejaj stabanoj lastmomente testiĝis pozitive, tiel ke ŝia kolegino devis labori pli forte (feliĉe kelkaj partoprenantoj pretis asisti). Malgraŭ ĉi tiuj malhelpoj oni baldaŭ retrovis la konatan agrablan etoson de la studosemajnfinoj kaj preskaŭ forgesis la dujaran paŭzon! Ĉeestis 26 studantoj, inter kiuj 11 novuloj. Ilin instruis Roel Haveman, Bert de Wit, Fransuaz Pellegrin, Lode Van de Velde kaj Piet Glorieux.

La dua studosemajnfino de 2022 okazis de la 14-a ĝis la 16-a de oktobro, nun denove kun kutima nombro da partoprenantoj (36, inter kiuj 15 novuloj). Pro kaŭzoj ne tute klaraj estis pli malfacile ol iam antaŭe kompletigi la instruan teamon. Feliĉe ni finfine sukcesis, kaj la pozitiva rezulto estis, ke tiel ni varbis novajn instruistojn kaj ankaŭ trovis plurajn interesatojn por posta kunlaboro. Ĉi-foje instruis Rob Groeneveld, Roel Haveman, Bert de Wit, Geomar Martínez Pérez kaj Paweł Fischer-Kotowski. La organiza teamo daŭre konsistas el Lilian van der Burgt, Ineke Emmelkamp kaj Arjen-Sjoerd de Vries. La konstanta ejo de la studosemajnfino estas la naturamika domo *Krikkenhaar* apud Almelo, kie ni senpage povas lasi niajn aĵojn en la mansardo.

## Hodler iras al Pollando (samkiel li iris en 1916!)

Biblioteko Hector Hodler: UEA kaj la Pola nacia biblioteko atingis interkonsenton pri la transdono de ĉiuj restantaj materialoj de Biblioteko Hector Hodler. Laŭ la kontrakto ĉiujn kostojn de pakado kaj transporto pagos la Pola nacia biblioteko. Ĝi restos“Biblioteko Hector Hodler” kaj estos tiamaniere trovebla kaj serĉebla per la biblioteka katalogo. Gravan rolon en la sekurigo de la transdono havis la antaŭa prezidanto de UEA, Mark Fettes. Fonto: Libera Folio 16-1-2023


## Inaŭguriĝis la 14-a Ĉina Kongreso de Esperanto

La 25-an de marto okazis en Pekino la 14-a Ĉina Kongreso de Esperanto, kiun ĉeestis pli ol 400 esperantistoj fizike kaj rete. La kongreso, organizita de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), kun la temo ‘nova epoko, novaj taskoj kaj nova progreso’ altiris 250 partoprenantojn en la kongresejo kaj 180 per videoligo. La inaŭguron ankaŭ videolige ĉeestis Duncan Charters, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA), So Jinsu, estrarano de UEA kaj prezidanto de Korea Esperanto-Asocio. Pli ol 20 landaj kaj internaciaj Esperantaj organizoj kaj esperantistoj sendis salutmesaĝojn al la kongreso aŭ videe aŭ skribe, ekzemple Nishinaga Atushi nome de la Azi-Oceania Komisiono de UEA (KAOEM), Ahmad Reza Mamduhi de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Dominiko Simeone de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kaj Kitagawa Ikuko de Japana Esperanto-Instituto, So Jinsu (estrarano de UEA) de Korea Esperanto-Asocio, Ángel Arquillos de Hispana Esperanto-Federacio, Mireille Grosjean de Svisa Esperanto-Asocio, Belo Horizonte de la Societo Esperantista de Minas-Ĵerajso (SEM) de Brazilo, Renato Corsetti (eksa prezidanto de UEA) kaj tiel plu. Ankaŭ fizike partoprenis brazila kaj itala esper-

antistoj. Menciinde estas, ke en la inaŭguro ĉeestis oficistoj de la Ĉina Ministerio pri Edukado, montrante zorgadon pri ĉi-flanka edukado de la registaro.

Estas la unua fojo, ke Pekino gastigis tutlandan kongreson de Esperanto. En la kongreso, oni elektos novan estraron de ĈEL. Liu Dawei, vicprezidanto de ĈIKG, estis novelektita kiel prezidanto de ĈEL.La novaj vicprezidantoj estas Chen Wenge, Wang Hanping, Hu Kaimin, Wang Junxiao, Cao Shengqiang, Wang Danhui, Yang Huajie, Zhou Tianhao, Liu Haitao kaj He Ning. Chen Ji kaj Jiang Limin rolas kiel ĝenerala sekretario kaj vicĝenerala sekretario de ĈEL. Krome 157 membroj de la komitato kaj 47 konstantaj membroj de la komitato estis aceptitaj.

La nuna oficanto Chen Ji sukcese reelektiĝis kiel ĝenerala sekretario. Tio estas ofico, kiun ni trovus simila al prezidanto.




## Vikipedio – tri-umfo

33 333 artikoloj ege ofte aperis en tiu retejo, kie Esperanto ege ĉeestas kaj konigas nin. Ni pli kaj plu kreskigu ĝin! La libroservo de UEA vendas gvidilon al Vikipedio.

**Vikipedio por vi**. Kiel ĝi funkcias, kiel vi kontribuas. *Ziko van Dijk*. **Scienco kaj tekniko** / **informadiko**. Espero. Partizánske. 2008. 57 paĝoj. Prezo: 3.00 €

Mirejo Grosjean

## Itala kurso en la lastjara urbo de la itala kongreso

d-ro **Luigi Fraccaroli, v**ia Crocifissa di Rosa 63, IT-25128 Brescia

Tel: (+39) 030 306809; fax/TK (+39) 030 5103111; cell/PT (+39) 348 7842198
ankaŭ ĉe WhatsApp mail/retpoŝto: luigi.fraccaroli@esperanto.it
Retpoŝto: luigi.fraccaroli@biologo.onb.it

========= vortoj: 1370 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

EKO 2023 (ĝis 20) videbla ĉe:kaj elŝutebla de: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.